I. F. E. A.

ASSOCIAZIONE ITALIANA FERROVIERI ESPERANTISTI

Aderente alla INTERNACIA FEDERACIO ESPERANTISTA FERVOJISTA (I. F. E. F.);
alla UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO (U. E. A.) e alla FEDERAZIONE ESPERANTISTA ITALIANA (F. E. I.)
Sede Centrale: Dopolavoro Ferroviario - Piazza Calderini 4 - Bologna (Italujo)

# Informal Bulteno

ESPERANTO

ITALA FERVOJISTA ESPERANTO - ASOCIO

REDAKTEJO: Bologna - Via Donato Creti N. 61 - Tel. 59-071 REDAKTORO: Gimelli p. I. Germano

N° 5-6 Majo Kaj Junio 1963-a 12-a Jaro

## 34ª ITALA KONGRESO DE ESPERANTO

SAINT VINCENT - AOSTA VALO - 14-19 SEPTEMBRO 1963

Sub la aŭspicoj de la REGIONA ADMINISTRADO de la Aosta Valo (Italujo), kaj per kunhelpo de la Regionaj Instancoj por Publika Instruado kaj por Turismo, kaj de la Societo S.I.T.A.V (Societo por Disvastigo Turisma kaj Hotelgastama de la Aosta Valo), okazos en la Aosta Valo-oficiala sidejo en Saint Vincent, ĉe la"KONGRESA CENTRO" de Grand Hotel Billia- de la 14a ĝis la 19a septembro 1963a la 34ª ITALA KONGRESO DE ESPERANTO.

La programo prezentas plurajn allogaĵojn, ne nur ŝatataj de la sperta kaj novbakita Esperantisto, sed ankaŭ invito al nekonanto la Internacian Lingvon, ilo de interŝanĝo kaj amikeco inter ĉiuj popoloj.

La dua nacia Konkurso en E. por mezgradaj studentoj; la pergrada Enkonduko de E. en la lernejojn; la specifaj prelegoj pri la uzado de E. en Radio-TV, en Turismo kaj Industrio; la oratora junulara konkurso en E.; la fakaj kunvenoj; la E.-Ekspozicio; la kulturaj kaj turismaj vizitoj (inter kiuj la Tunelo tra la Blanka Montaro, kaj Olivetti); la oficiala BANKEDO kaj la du danca kaj folklora vesperoj; la ensorĉanta pejzaĝo, eble unika en la mondo: jen la konkretaj allogoj de la 34ª.

La aliĝkotizoj, sendendaj al la adreso:

34ª ITALA KONGRESO DE ESPERANTO - "CENTRO CONGRESSI" SAINT VINCENT (Aosta Valo)

estis fiksitaj de I.E.F. jene:

| | ĝis 30-VI | poste |
|---|---|---|
| - F.E.I.ano (ĝis 1963 inkluzive) | L. 1.500 | L. 2.000 |
| - Familiano; junulo ĝis 21; studento ĝis 26 | " 1.000 | " 1.500 |
| - Asocioj; E. Grupoj; Oficialaj Instancoj; ne-Membroj F.E.I." | 2.000 | " 3.000 |
| - Blindulo; kaj po unu akompananto | senpage | ——— |
| - Eksterlandanoj | " | ——— |

Por la loĝiĝo bonvolu skribi rekte al la hoteloj, aŭ al la loka Turisma Instanco de Saint Vincent; aŭ sendi, skribante en Esperanto, ĉambromendon por la elektita hotelo aŭ nur por la dezirata kategorio aldonante £. 2.500, el kiuj 2.000 por antaŭmendo, kaj 500 por elspezoj (kongresa kaso)

La aliĝoj por la ekskursoj estos ricevataj je la alveno de la Kongresanoj.

ALIĜU AMASE. SKRIBU ESPERANTLINGVE. AFRANKU FILATELE.

**PROVIZORA PROGRAMO**

**Sabaton, 14an: Alveno Kongresanoj - Disdono dokumentoj (Arrivo congressisti – distribuzione documenti)**

**Horoj 18 - Gazetara Konferenco (Conferenza Stampa)**

**20 - Estraro de I. E. F. (Consiglio F. E. I. )**

**21 - Interkona Vespero ( Serata di incontri e conoscenza)**

**Dimanĉon 15an:**

**Horoj 8,30 - Sankta Meso (Santa Messa)**

10 -SOLENA INAUGURO (Inaugurazione solenne).Premiado studentoj de la II NACIA KONKURSO DE E.(Premiazione studenti del II CONCORSO NAZIONALE DI E.)
12,30-Honora vermuto, oferota de la Direkcio de la NOVA AKVOTRINKLOKO DE SAINT VINCENT (Aperitivo d'onore offerto dalla Direzione delle NUOVE TERME DI SAINT VINCENT)
15 -ĜENERALA ASEMBLEO DE I.E.F. (ASSEMBLEA GENERALE DELLA F.E.I.)
18 -Junulara oratora konkurso (Concorso di oratoria per la gioventù)
19 -Jara kunsido de I.F.E.A. (Fervojistoj) (Convegno annuale Ferrovieri esperantisti)
21,30-Solena Esperanto dancfesto (Serata danzante dell'esperanto). Premiado de la oratora konkurso (Premiazione del concorso di oratoria)

Lundon, 16an:

horoj 8 -Skribaj ekzamenoj de E. (Esami scritti di E.)
8,30-Jara kunsido de I.I.E. (Itala Instituto de E.) (Convegno annuale Istituto Italiano di E.)
9,30- Kongresaj laboroj (Lavori del Congresso)
11,30- Publika Prelego: "E. kaj Turismo"(Conferenza pubblica:"E.e Turismo) S.re Pennazzi.
14,30- Ekskurso per turisma aŭtobuso, oferota de la Regiona Instanco por Publika Instruado, al la Kastelo de Fenis (Gita in pulman offerta dall'Assessorato P.I. al Castello di Fenis)
17 -Daŭrigo al la Aosta urbo, vizito kaj akcepto ĉe la Aŭtoritatoj (Proseguimento per la città di Aosta, visita e ricevimento Autorità)
21 -ESPERANTO-OFICIALA BANKEDO, afable oferota de la REGIONA INSTANCO de Aosta Valo, kaj de S.I.T.A.V. (PRANZO DI GALA DELL'E. gentilmente offerto dalla REGIONE AUTONOMA Valle d'Aosta e della S.I.T.A.V.) Malhela vesto; Abito scuro)

Mardon, 17an:

Horoj 8 -Daŭrigo ekzamenoj de E. (Continuazione esami di E.)
8,30-Jara kunsido de I.L.E.I. (Instruistoj) (Convegno annuale degli Insegnanti Esperantisti): kaj ĜENERALA DISKUTADO pri ENKONDUKO de E. en la LERNEJOJN ( e discussione Generale sulla Introduzione dell'E. nelle Scuole).
10,30-Publika Prelego: E. en RADIO-TV "(Conferenza pubblica: E. e RADIO TV) Cav.Minnaja.
11 -Jara Kunsido de I.E.J. (Junularo) (Convegno annuale della Gioventù esperantista)
14,30-EKSKURSO al la urbo IVREA kaj VIZITO de la fama skrib- kaj kalkul -maŝinfabriko OLIVETTI (GITA alla città di IVREA e VISITA alla nota fabbrica di Macchine da scrivere e da calcolo OLIVETTI)(maksimume 100 personoj; massimo 100 persone)
-(aŭ - oppure) Ekskurso al la piedoj de Monte Rosa: (Gita ai piedi del Monte Rosa): Saint Vincent- Verrès - Brusson - Champoluc - Col du joux-Saint Vincent.
21 -FOLKLORA VESPERO, afable oferota de la REGIONA INSTANCO de Aosta Valo kaj de S.I.T.A.V.(SERATA FOLCLORISTICA, gentilmente offerta dalla REGIONE AUTONOMA Valle d'Aosta e della S.I.T.A.V.)

Merkredon,18an:

horoj 8 -Fermo de la E. ekzamenoj (Chiusura esami di E.)
9 -Daŭrigo kaj fermo de la kongresaj laboroj (Continuazione e chiusura dei lavori Congresso)
10,30-Publika Prelego: "Industrio kaj E." (Conferenza pubblica: Industria ed E. (S.re Bortoletti)
14,30-Ekskurso per turisma aŭtobuso al Cogne, kaj akcepto ĉe la minejo, kaj aliaj vizitoj (Gita in pulman a Cogne, e ricevimento alla miniera, e altre visite)
21 -Libera vespero (Serata libera)

Jaŭdon,19an:-TUTTAGA EKSKURSO (GITA DI TUTTA LA GIORNATA)

horoj 8 -Ekveturo per turisma aŭtobuso al Aosta, Coumayeur kaj Plan Pincieux (Partenza in pulman per Aosta, Courmajeur e Plan Pincieux) Dumvojaĝaj vizitoj (Visite intermedie)
13 - Komuna tagmanĝo en loka Restoracio aŭ libere (Pranzo comune in ristorante locale e liberamente)
15 - Lokaj ekskursoj kaj vizitoj laŭvole (Escursioni e visite locali a piacere ): Entrèves - Traforo Monte Bianco-Notre Dame de la Guèrison - Val Veni-Rifugio Torino.
18,30-Revono al S. Vincent - Oficiala FERMO de la KONGRESO, kaj ĝisrevidsalutoj (Ritorno a S. Vincent - CHIUSURA Ufficiale del CONGRESSO, e commiato.-

48-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO - SOFIO - 3-10 VIII 1963

Sub la Honora Protektado de Georgi Trajkov, Unua Vicĉefministro. Konstanta Adreso: UEA, Nieuwe Binnenweg 176 Rotterdam, Nederlando.

Oficialaj Komunikoj-

Fervojaj rabatoj - Krom la jam anoncitaj landoj (Aŭstrujo, Bulgarujo, Hungarujo, Svisujo) ankaŭ la Fervojo de Grekujo donas al la partoprenantoj en la 48-a U.K. rabaton de 25% je aĉeto de revenbilieto kaj je monstrado la Kongresa Karto. La Fervojo de Francujo donas rabaton de 20%.

Valutaj leĝoj en Bulgarujo - La enportado en Bulgarujon kaj elportado el Bulgarujo de bulgara valuto estas malpermesita. La enportado de alilandaj ĉekoj kaj mono en Bulgarujon estas permesita sen limigoj je la kondiĉo, ke la sumo kaj la speco de la enportata monu estu avizita ĉe la limo, por ebligi ĝian postan elportadon. La elportado de ĉekoj kaj de mono alilanda el Bulgarujo, kiuj ne estas avizitaj ĉe la enportado, estas nepermesita.

Infana Kongreseto. - La Loka Kongresa Komitato atentigas ke post la 30-a de junie absolute ne plu eblas akcepti aliĝojn al la 8-a Internacia Infana Kongreseto. Ĝi sekve instigas ĉiujn interesiĝantojn aliĝi kiel eble plej frue.

Grava - La ĝojiga fakto ke tiel grandnombre alvenis ĝis nun la aliĝoj al la 48-a U.K., devigas la Lokan Kongresan Komitaton antaŭvidi ke la partoprenantoj estos pli ol 3000. Bedaŭrinde en Sofio ne troviĝas teatro, kiu povas enteni tiom da personoj kaj pro tio L.K.K. estas devigita informi ke la kongresanoj, kies numero estas pli alta ol 3000,

ne havos la eblecon en Sofio ĉeesti la du oficialajn teatrajn prezentadojn, kiuj okazos la 5-an kaj la 7-an de aŭgusto. La nombro de la ĉeestantoj de ĉiu alia arta programero ne estas limigita. - Ĉiu aliĝinto kun kongresa numero pli alta ol 3000 ricevos respondilon, kiu estas resendenta al la kostanta adreso de la Kongreso per kiu li/ŝi akceptas aŭ malakceptas la menciitan kondiĉon. En kazo de malakcepto la pagita aliĝkotizo estos redonita.

Konfirmo Loĝado.- Pro la ne tre rapidaj poŝtaj ligoj inter Bulgarujo kaj eksterlando, la ricevo de la konfirmilo pri la loĝado en Sofio okazas plej ofte kun prokrasto de pluraj semajnoj. La mendintoj bonvolu tion konsideri.

Enirvizo.- Tiuj personoj, por kiuj estas malfacile persone viziti bulgaran diplomatian reprezentanton, povas peti la enirvizon per letero. Oni devas unue peti specialajn formularojn, kiujn oni resendu, plenigitaj, kun la pasporto, du fotoj, kongresa karto kaj la egalvalore de $ 1,50.-

Loĝado en Sofia.- La Loka Kongresa Komitato informas ke estas absolute neeble aranĝi tranoktadon por tiuj kongresanoj, kiuj alvenos en Sofio sen antaŭe esti mendintaj kaj pagintaj sian loĝadon. Por ke oni ne devu mem serĉi liberan ĉambron en nekonata urbo, L.K.K. varme konsilas antaŭ ol alveni en Sofio.

Cseh-Seminario. - La 30-a de Junio 1963 estas la limdato por aliĝo al la Seminario por Csehmetodaj instruistoj, kiu okazos en la kadro de la 48-a U.K. la aliĝkotizo estas 12- ned gld. Por ke ĉiu interesiĝanto havu la eblecon partopreni la Seminarion, ni konsilas atenti la menciitan limdaton.

Tendumejo. - Ni informas la interesiĝantojn ke en aŭ apud Sofio ne troviĝas tendumejo. Oni eventuale povas libere tendumi ekster la urbo, sed tio estas je propra respondeco.-

Fervojaj Rabatoj.- La Ministerio pri la Bulgaraj Fervojoj sendis novan cirkuleron al ĉiuj Fervojaj instancoj en Eŭropo por informi pri ĉiuj fervojaj rabatoj por kongresanoj. La cirkulero portas la numeron 5-52-10 kaj la daton de la 18-a de majo 1963. Oni citu tiun cirkuleron, se en vojaĝoficejo oni montras sin neinformita.-

Speciala vagonaro post la Kongreso. - L.K.K. estas aranĝanta specialan vagonaron de Sofio al Beograd en la posttagmezo de la 10-a de aŭgusto por tiuj, kiuj devas tranokti tie por kapti vagonaron hejmen la morgaŭan matenon. Interesitoj bonvolu anonci sin plej malfrue ĝis la 20-a de julio.

Limdato aliĝado en Sofio. - L.K.K. decidis ke aliĝoj pagitaj al Sofio povos esti akceptitaj plej laste ĝis la 20-a de junio 1963. Por aliĝoj pagitaj al Rotterdam la lasta limdato restas la 30-a de junio 1963.

Loĝado kaj ekskursoj.- L.K.K. ne povas garanti la plenumon de mendoj pri loĝado kaj ekskursoj, kiuj alvenos post la 10-a de julio 1963. Oni nepre sendu siajn mendilojn kiel eble plej baldaŭ.

Konkurso dum la balo.- Dum la Oficiala Balo oni aljuĝos premion por la plej pitoreska nacia kostumo.

Fotokunkurso.- Oni ensendu siajn konkursaĵojn kiel eble plej baldaŭ; la limdato estas la 20-a de julio. Por la reguloj vidu "Esperanto" de marto kaj aprilo 1963 La unua premio konsistas el fotoaparato !

Fakkunveno de la Fervojistoj:- La fakkunveno de la Fervojistoj Esperantistoj okazos la 7-an de aŭgusto 1963-a je la 15-a horo. Oni intencas aranĝi specialan programon apartan ekskurson per fervojo.

Statistiko (ĝis 20.5.63): Arabujo 1, Argentino 2, Aŭstralio 5, Aŭstrujo 31, Belgujo 49, Brazilo 2, Britujo 95, Bulgarujo 757, Ĉeĥoslovakio 5, Danlando 69, Finnlando 49, Francujo 290, Germana Fed.Resp. 115, Germana Dem.Resp. 54, Hispanujo 9 , Hungarujo 97, Irlando 2, Islando 2, Israelo 5, Italujo 206, Japanujo 6, Jugoslavio 50, Kanado 3, Meksiko 4, Monako 3, Nederlando 128, Nigerio 2, Norvegujo 13, Nov-Zelando 5, Pollando 307, Rumanujo 5, Sovetunio 48, Svedujo 165, Svisujo 19, Usono 17, Vjetnamio 1.

Entute 2624 el 39 landoj - Konstanta Kongresa Segretario G.G. Pompilio

## Kongreso de Esperanto en STOKE-ON-TRENT

Kiam, pasintjare, S-ro Horace Barks, anoncis ke li estas preta organizi en Anglio la XV-an Internacian Fervojistan Kongreson, mi rigardis lin, ne nur sur prize, sed ankaŭ kun moka rideto.

Prepari kongreson, post tiu mirinda en Budapeŝto, ŝajnis al mi, tromemfido, ĉar mi sciis ke li devus kalkuli nur je malmultaj kunlaborantoj.

Tamen la kongreso okazis en Stoke-on -Trent de la 11-a ĝis la 17-a de majo, kaj mi devis persone konstati ke S-ro Barks kaj liaj gehelpantoj preparis ĉion tiel zorge, ke la partoprenintoj ricevis bonegan impreson kaj ĝujs tiun ĉi kongreson same kiel la antaŭajn.

Protektantoj de la kongreso estis: la ĉefurbestro de Stoke, S-ro T.W.Beddow, kav. Harold Clowes, kav. George Wade, al kiu ni ŝuldas la belegan fajencan kongres-insignon, S-roj Geoge Dowe kaj Charles Stuart, direktoroj, respettive, de la nova divizio kaj distrikto de Stoke-on-Trent de Britaj Fervojoj.

La urbego Stoke (mi povas paroli pri urbego, ĉar ĝi rezultas de kunesto de ses urbetoj) situas en la mezo de belega verda kamparo, kaj ricevas sian famon, ne nur de la nombraj karbominejoj kiuj troviĝas en la ĉirkaŭaĵoj, sed precipe de la tricent potfabrikejoj, kiuj alportas tra la mondo, la nomon de Stoke kune kun tiuj de la plej famaj fajencaĵoj nome Wade, Spode Copeland, Wedgwood, k.t.p.

Dimanĉe, la 12-an de majo, komenciĝis la laboroj de la kongreso per la solena malfermo, al kiu donis specialan gravecon la festparolado de D-ro Ivo Lapenna, unu el la plej brilaj kaj eminentaj oratoroj de nia movado, kaj bonumoron kaj ĝojon la ĉeesto kaj parolado de la plej famkonata Stoke-on-Trentanino: fraŭlino Marjorie Boulton.

Du folklorvesperoj, dum kiuj knaboj kaj knabinoj de la urbaj lernejoj, prezentis dancojn tipajn de Skotlando, Irlando, Kimrujo, Francio, Polujo, k.t.p., la prezentado de dramo de f-ino Boulton: "Drasta kuracado"; la Internacia balo, la vizito al Muzeo de Hanley plenigis niajn vesperojn.

Vizitoj, laŭdezire, al potfabrikejoj aŭ al karbminejoj, estis permesataj al kongresanoj kiuj interesiĝas pri tiuj aferoj.

Certe ĉiuj ricevis profundan impreson antaŭ la fama teleskopego "Jodrell Bank" kiu kontrolas la orbojn de la artefaritaj satelitoj. Ni atingis ĝin preterpasante aŭtobuse, herbejojn kaj dolĉajn montetojn tiel verdkolorajn kiel certe oni ne vidas en aliaj landoj. Aro da kortbirdoj, da ŝafoj kaj grandmamaj bovinoj moviĝis kaj variigis la, aliflanke, unuforman kamparon. Antaŭ ĉiuj domoj estis ĝardeneto, kaj de ĉiu fenestro, tra la blankaj kurtenoj, okulumis potoj, plenplenaj da floroj kiuj lumigis la grizan ĉielon kaj la ruĝgrizajn dometojn.

Rava, mirinda urbeto estas Llandudno. Ankaŭ se mi ne povas konsenti kun ĝia kromnomo:"Napoli de la nordo", ĉar la diferencoj montriĝas evidentaj kaj multnombraj inter la du urboj, tamen tio ne signifas ke ĝi estas malpli bela. Ho ! male ! Situanta en duoninsulo, laŭlonge perfekta arkforma golfo formas idealan kaj idilian ripozlokon kie tre volonte oni pasigus la vivon. Tie la lokaj esperantistoj akceptis nin kaj akompanis delegacion malgrandan ĉe la urbestro.

Tie okazis ankaŭ la nedezirata, sed bezonata, fermo de la kongreso.
Legante ĉion kion mi skribis supre, oni povas pensi ke nur tra festoj kaj ekskursoj ni pasigis la kongressemajnon: male la ĉefa celo de nia jara renkonto ne estis forgesata. Fakaj kunvenoj okazis preskaŭ ĉiumatene kaj le fakprelego, vere tre interesa, verkita de S-ro Pickard kaj tradukita de S-ro Frank Curtis, allogis la multajn ĉeestantajn kongresanojn. Ĝi pritraktis la rilatojn nunajn kaj estontajn, inter la Britaj Fervojoj kaj la kontinento.
Do mi opinias ke ankaŭ ĉi jare la celo de nia kongreso estas atingita. Ni laboris sukcese en faka kampo kaj faris, pro tio, bonan propagandon ĉe fakaj kolegoj montrante al ili la utilecon de la Internacia Lingvo.
Al ĉefurbestro S-ro Beddow, ni estas dankemaj ne nur pro la luksa vespermanĝo per kiu li regalis nin, kaj al kiu li mem kun sia edzino ĉeestis, sed precipe ĉar li titoligis novan straton al "Esperanto" en nova urba kvartalo, kun la ĉeesto de radio kaj televid-servoj, per kiuj dum la vesperaj elsendoj ni povis la duan fojon ĝui la manifestacion.

DELVINA GIMELLI

## DUA TICINA EKSKURSA KUNVENO EN LUGANO

Dimanĉon la 9-an de junio okazis en Lugano la dua Ticina Ekskursa Kunveno.
Multaj italaj kaj svisaj Esperantistoj partoprenis en ĝi, ĉar logis la loko, la ekskursa programo, kaj la parolado de Inĝ. Azzi pri la enkonduko de Esperanto en la lernejojn.
Tre interesa estis la vizito al dissendpalaco de "Radio Monteceneri" kie, tre afable, ni estis akceptataj kaj gvidataj tra la tre modernaj instalaĵoj. Dum la luksa tagmanĝo, S-ro Sasselli kaj S-ro Visani, Svisa Konsilisto, salutis la partoprenantojn en la nomo de la svisaj kaj ticinaj esperantistoj. Respondis al ili Adv. Barbiellini Amidei, Prezidanto de Itala Esperanto-Federacio, dankante flanke de la italoj.
Bedaŭrinde la vetero ne estis favora al nia ekskurso al "Casa Coray", ĉar pluvegis kaj ni ne povis eĉ vidi la belegan lagon kaj viziti la muzeon. Tamen ni ĝuis la tre interesan kaj elokventan paroladon de Inĝ. Azzi, membro de nia Asocio, al kiu ni varme aplaŭdis.
Koran dankon ni sendas al la svisaj gesamideanoj kiuj organizis tiun amikan renkontiĝon kaj precipe al tre juna kaj tre lerta Carlevaro al kiu ni deziras, en la esperanta movado, daŭran brilan vojon.

## E S P E R A N T O   E N   L A   R A D I O

RADIO ROMA - Esperanto-Fako Casella Postale 320 ROMA (Italujo)
La dissendoj okazas de la 18,55 h. ĝis 19,10 h. (M.E.T.) Ondlongoj: 30,90; 41,24; 50,34 metroj. Ĉiujn-merkredojn: Kuriero de Esperanto. Prelegantoj: marde kaj merkrede: S-ro Luigi MINNAJA - vendrede: Prof.D-ro Vincenzo MUSELLA
JULIO 1963-a - mardon la 2-an: Tra la literaturo - vendredon la 5-an: La interna genezo de la "Dia Komedio" - mardon la 9-an: Novaĵoj el Italujo - vendredon la 12-an: Mondfamaj operkantistinoj de la 19-a jarcento: Adelina Patti - mardon la 16-an: Italaj kanzonoj en Esperanto - vendredon la 19-an: L'Aquila kaj ĝia provinco - mardon la 23-an: Leterkesto - vendredon la 26-an: El la "Dekamerono" de Giovanni Boccaccio: "Kikibjo, la kuracisto" - mardon la 30-an: Etruskaj urboj: Tuscania.
AŬGUSTO 1963-a - vendredon la 2-an: Italaj komponistoj: Pietro Mascagni - mardon la 6-an: Tra la literaturo - vendredon la 9-an: La ĉambroj de Raffaello en la Vatikanaj Muzeoj - mardon la 13-an: Novaĵoj el Italujo - vendredon la 16-an: S.ta Giovanni Bosco, okaze de la 75-a jarreveno de la morto - mardon la 20-an: Italaj kanzonoj en Esperanto - vendredon la 23-an: Italaj turismaj urboj: Trieste - mardon la 27-an: Leterkesto - vendredon la 30-an: la itala Humanismo.

La fakestro: L. MINNAJA

RADIO VARSOVIO - Programo de la elsendoj en Esperanto ĝis Oktobro 1963-a
Radio Varsovio dissŭdigas ĉiutage de la horo 16,30 ĝis la 17 horo laŭ mezeŭropa tempo duonhoran programon en Esperanto sur jenaj ondoj: 25,19; 25,42; 31,01; 31,45; 31,50; 41,27; 42,11 metroj, kaj sur meza ondo 200 metroj. Aŭskultu.